

SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"

Jarabono : 15 F al Fédération d'E* du L-R. CCP 956-28 P Montpellier

2a Kvaronjaro 1985

N° 93

*

NIMES

(NIMO)

La Franca Romo

ARTA URBO

Turisma Centro por Gardo
kaj la regionoj :

PROVENCO kaj LANGVEDOKO

Nimes estas la turisma centro la plej bone lokita kaj la plej rekomendita por esplori Gardon kaj la najbarajn departementojn kaj por viziti : la intermontajn krutejojn de Gardono, la Romian Akvodukton de Nimes (Ponto de Gardo), Aigues-Mortes, Saint-Gilles, Alès, Uzès, Le Vigan, Arles, les Saintes-Maries, la Monton Aigoual, la intermontajn krutejojn de l'Tarn.

Rondvojaĝoj organizitaj de la Turisma Oficejo okazas per komfortaj veturilejoj dum la sezono.

Por viziti la urbon kaj la ĉirkaŭaĵojn, la turistoj nur prezenti sin ĉe la Turisma Oficejo, kie ĉiuj informoj estos donitaj kaj ĉefe raporteto permesanta sin konduki facile.




NIMES, urbo kun milda kaj modera klimato estas la ĉefurbo kaj la administracia centro de la departemento Gardo. Ĝi enhavas preskaŭ 150.000 enloĝantojn. Fiera pro sia glora pasinteco, la urbo montras ĉiupaŝe la postrestaĵojn de la malnova « Colonia Nemausensis ».


La malnovaj fortikajoj, seskilometra ĉirkaŭo estis konstruita sur la kresto de sep montetoj. Tial Nimes povis esti nomita : « La Sepmonteta Urbo ». Ili estis provizitaj de sesdek turoj ; norde de tiuj fortikajoj, sed ne al ili apartenante, starigas la majesta Tour Magne (Grandega Turo), la plej malnova romia monumento de Francio, starigita je la gloro de Domitius, proksimume antaŭ 120 jaroj antaŭ J.K. Tiu turo memorigas similan monumenton starigitan sur la italia vojo, apud la Grande Turbie. Oni povas atingi hodiaŭ la pinton de la Tour Magne per interna ŝtuparo de 140 ŝtupoj konstruita en 1843 (Admirinda ĉirkaŭvidaĵo).

La pordo de Arles, nomita Pordo de Aŭgusto konstruita proksimume antaŭ 20 jaroj antaŭ J.K., la Pordo de Hispanujo nomita : Franca Pordo estas la nuraj postrestaĵoj el sep aŭ ok pordoj de fortikajoj, kiuj ĉirkaŭis la urbon. Meze de la romia Civito estis la Kapitulo nun nomata la Maison Carrée (Kvadrata

Domo) konstruita antaŭ nia erao kaj dediĉita en la 1a jarcento al Caius kaj Lucius filoj de Agrippa, nepoj de « Aŭgusto Imperiestro ». Tiu verko majstra pro gracieco kaj harmonio, fama en la tuta Mondo estas nun uzata kiel Antikvaja Muzeo kaj posedas rimarkindan mozaikon, statuojn kaj tombŝtonojn.



Sed la romia arto malkovras sin en sia plej tipa aspekto en la Amfiteatro, kiu datiĝas de la unua jarcento. Tiu grandioza Monumento estas en multe pli bone konservata stato ol la Koloseo de Romo. La ĉirkaŭo havas 355 metrojn. En tiu Amfiteatro povis sidi 22.000 rigardantoj. Eĉ hodiaŭ, okeze je Teatraĵoj aŭ Taŭroludoj la malnova monumento, ĉiam starante malgraŭ la jarcentoj, povas enhavi preskaŭ tiome.



Pasie ekflamiĝantaj pro Amfiteatraj Ludoj kaj egale por la publikaj banoj, la Gallo-Romanoj konstruis Thermes (banejo) kun konstruaĵoj ĉirkaŭantaj la fonton de Nemausus, en pejzaĝa loko, kiu fariĝis la Fonta Ĝardeno, desegnita de Lenôtre en la XVIIa jarcento kaj daŭrigita en XVIIIa jarcento. La Tempio de Diana, ruinaĵoj kaŝitaj sub foliaro estas hodiaŭ la juvelo de tiu ĝardeno.


La Musée Lapidaire (ŝtonskriba Muzeo) unu el la plej riĉaj en Eŭropo, kie pli ol milo da surskribaĵoj kaj multaj arkitekturaj aŭ skulptaj pecoj estas vidindaj, alplenigas la retrospektivan vizon de la galio-romia civito.

La Katedralo, Monumento el romanika arkitekturo povas esti kunligo inter la Romiaj kaj la Modernaj Monumentoj inter kiuj la ĉefaj estas la Sankta-Paŭla preĝejo, konstruita en la stilo Romanbizanca kun freskoj de Flandrin, la Justicia Palaco, la Muzeo de la Malnova Nimes, la Muzeo de Belaj Artoj. Tie oni trovas kelkajn verkojn el la plej bonaj, la Muzeo de Naturscienco unu el la 4 plej riĉaj provincaj muzeoj.

En la centro de la Esplanado, belega Monumento alegoria Fonto, ĉefverko de Pradier ; ankaŭ vidotaj la Monumento de la Infanoj de l'Gardo mortintaj por la Patrolando en 1870, la Monumento de tiuj kiuj mortis dum la unua mondmilito, kaj la Monumento de la Rezistaj Martiroj.

Multegaj statuoj kaj bustoj ornamas la publikan ĝardenon kaj la ombrigitajn avenuojn : Alphonse Daudet, la poeto Jean Rebul, la pentristo Jalabert, la felibro (poeto aŭ verkisto en lingvo « OC ») la arkitekturisto Revoil, la Imperiestroj Aŭgusto kaj Antoneno la Pia.





La Ponto de Gardo, 22 kilometrojn de Nimes, estis parto de romia akvodukto, konstruita de Agrippa por konduki al Nimes la akvon de la Fonto de Eure apud Uzès. Tiu akvodukto konkudis la akvon per simpla deklivo inter la montetoj, kaj tra subteraj lokoj ĝis la Castellum Divisorium (Divida Kastelo), kies ruinaĵoj estas videblaj, ĉe strato de la Lampeze en Nimes. La alteco de la Ponto de l'Gardo estas je 49 metroj, ĝia longeco estas 269 m. La impona beleco de tiu kolosa Monumento kuŝas ne nur en ĝia triobla vico de arkaj sidantaj unu sur alia, sed ankaŭ en la perfekta harmonio kiu regas inter la akvodukto kaj la severa kaj mirinda situo meze de kiu ĝi estis konstruita.

Loka grupo : Centre Culturel Esperantiste

nur poŝtadreso : 213, avenue de Camargue
30120 CAISSARGUES

kunvenas ĉiulunde de 17a ĝis 19a en :

CENTRE PABLO-NERUDA - Bd Jean-Jaurès - NIMES

Federacia ĝenerala kunveno ^{la 5^{ta} de Majo} en NIMES

La kunveno komenciĝas je la 9h45 kaj finiĝas je la 12h15. Jean Hénin (J.H.) post dank-vortoj al la ĉeestantoj kaj al la organizantoj legas tre detalan agadraporton, kiu substrekas kelkajn kontentigajn rezultojn, sed notas mankon de emo al kunlaboro kaj reciproka informado.

Dank'al kelkaj mondonacemuloj kaj reboniĝo de la situacio koncerne nian federacian ligilon "Sudfrancia Stelo" (S.F.S.), la financa raporto de S-ino Lucette Négron (L.N.) prezentas pli sanan situacion.

S-ro René Llech-Walter (R.L.W.) raportas pri la landa kongreso de U.F.E., kiu okazis en Angers je Pasko. Pro ne taŭgaj datoj ĝi ne estis tre multe vizitata, sed interese estis la anonco pri kreiĝo de parlamenta informgrupo pri Esperanto. Cetere la detalan (sa) protokolon de la 77-a landa kongreso de U.F.E. oni povas legi en "Franca Esperantisto" n° 361, majo-junio 1985.

Koncerne S.F.S. rimarkindas, ke ĝi pli dikiĝis kaj estas informriĉa. Ni rezignis la U.F.E.-oferton kaj, dank'al favoraj multobligadkondiĉoj, ĝi pluestos fotokopiita en Montpellier. Dankon al tiuj kiuj kunlaboras (is) kun alvoko al ĉies kunlaboremo.

La buĵeno estas ankaŭ esprimilo. Propagandcele ni enŝovos pli da paĝoj en la franca lingvo kaj R.L.W. enlistigos bibliotekojn al kiuj ni sendos S.F.S senpage. Krom 1 voĉo (kiu pledis por I7F 00) ekde januaro la abonkosto por S.F.S estos 20,00F.

Nia bone konata kaj simpatia pola samideano Tyblewski principe konsentis prelegvojaĝi tra nia federacio en oktobro. Krome kandidatiĝis 2 Rumanoj, ŝajne lertaj esperantistoj.

Ni plezure notas, ke, nuntempe, okazas 2 lingvostaĝoj en nia federacio : apud Valras en majo kaj en Sète en septembro. Krome aliaj E-eventoj estas antaŭvidataj en Clermont-Ferrand, Gap, Mt Lozère k.a..

Samcele kiel nia regiona turisma libreto, C. Nourmont kunordigas la aferon naciska -la . J.H. refoje diras la neceson regule legi bonajn E-librojn. Helpe de sia filino Brigitte li entuziasme prizorgas la federacian libroservon kaj, ĉifoje, salutindas pli da sonbendoj; novaj propagandkartoj de U.F.E. k.s..

Estus bone pripensi ekspoziciotan materialon por budoj en nun disvastiĝantaj "foiroj de asocioj".

Ci-jare finiĝis la mandato de la jenaj federaciaj estraranoj kaj komitatanoj: D-ino Yvette Vierne (Y.V.), R.L.W. Roberto Frus (R.F.), Cesareo Borque (C.B.) kaj Frédéric Maurin (F.M.). Cilasta ne rekandidatiĝis kaj estis anstataŭata de Charles GERARD (4, rue Docteur Rives -Perpignan) dum la unuaj anoj estis reelektitaj.

Sekvis tre vigla diskuto pri mocio por la Ministro pri Edukado -kies plena teksto troviĝas en tiu-ĉi kajero de S.F.S. - kun ripetita sendo far la grupoj pere de la socia-listaj deputitoj. Tajpante tiun-ĉi protokolon mi povas diri, ke mi jam ricevis leteron de la socialista deputitino René Soum (Orientaj Pireneoj) en kiu ŝi diras, ke la mocion ŝi transdonis al la Ministro pri Edukado.

Pro urĝiga tempomanko Lucien Angevin (L.A.) ne povis interveni antaŭ ol finiĝu la kongreso kaj nur Luko povis iom saluti nome de la E-lernantoj de la Nima Liceo Feuchères.

Nia kutima aŭtuna federacia laborkunsido okazos en Sète (septembre) kadre de la E*-semajno kaj nia venontjara federacia kongreso ie en Hérault.

Jean Amouroux

IMPRESOJ PRI LA FEDERACIA KONGRESO.

Ni petis partopreninton en la federacia kongreso doni siajn impresojn.

Jen kelkaj utilaj rimarkoj :

"...Por rapide trovi la centron Pablo Neruda, planeto estus necesa. Tamen ni trovis facile la vojon dank'al: "Sekvu la sagon!"

En la libro-servo certe oni bone konsilis min sed baldaŭ venis multaj aĉetantoj, petante la atenton de la eksponanto. Mi ŝatus, per kartonoj scii la nivelon de la prezentataj libroj.

Miajn gratulojn pro la tiel klara, interesa, por ĉiuj komprenbla prelego de Sinjoro Moirand, kiu afable respondis al la ĉeestantoj.

Dum la vespermanĝo, tute bona estis la etoso kaj agrabla la babilado inter ni. La spektakla vespero estis vera sukceso ! Unue dank'al la du bonegaj ĥoroj el Nimo kaj ankaŭ al la teatraĵoj prezentitaj de la gesamideanoj el Béziers. Mi multe ŝatis aŭdi kelkajn esperantajn kantojn.

Dimanĉon matene ni tre utile laborokunsidis. Bona propagando estis la interparolado de junaj esperantistoj kun ĵurnalistoj. Mi esperas vidi ekzempleron de la artikolo en la loka gazeto.

Feliĉe, posttagmeze ni povis promenadi tra kelkaj belaj vidindaĵoj de la antikva urbo kaj efike babiladi kun la regionaj partoprenantoj.

Mi revenis hejmen iomete laca sed tre kontenta".

J. Manguine

====

FINANCA RAPORTO

Financa situacio de la Federacio je la 5a de Majo 1985:

Je la Kongreso de Millau la federacio posedis: 2118 F 87

	<u>enspezoj</u>		<u>elspezoj</u>
U.F.E.	672	SFS	2637,83
Libroservo	500	Staĝo (Lyon)	120
Abono	60	CCP	5
Donaco	5		
SFS abonoj	1662,80		2762,83
SFS:donacoj	340		
Ŝparkaso	280,85		
	<u>3520,65</u>		

Diferenco : Pozitiva saldo: 757,82

En la kaso: 2118,87 + 757,82 = 2876,69 (CCP:454,69 + ŝparkaso 2422 F)

====

"Sudfrancia stelo":

En 1984:

Enspezoj : 1125 F (75x15F) Elspezoj : 1766,73 F
1a numero: 516 F 2a: 448F
3a " : 419,90F 4a: 382,83F

En 1985:

Enspezoj: Abonoj: 1410F (94x15F) Elspezoj:
Donacoj: 340F 1a numero : 372F
1750F

====

Specialan dankon al la donacemuloj, dank'al kiuj SFS retrovis ekvilibron.

La personoj, kiuj ankoraŭ ne renovigis la abonon, bonvolu tuj fari pro la risko ne plu ricevi SFS.

====

La kasistino: L. Négron

La organizintoj de la federacia kongreso tutkore dankas S-inon Bonnafoux kaj S-ron Dalgon pro la malavaraĵ donacoj.

====

RAPORTO PRI LA UFE-KONGRESO

Dum Pasko, la Anĝevina Kultura Centro akceptis la 77-an Nacian Kongreson de Esperanto. Ĉeestis okdek partoprenantoj.

En la okcidenta parto de Francujo, Angers staras en la triangulo :Rennes,Nantes,Le Mans. Anĝevina mildeco, nova urbo, malnova urbo,kastelo de la Reĝo Renato,teksarto de Jean Lurçat (Apokalipso).

Akcepto de la kongresanoj, interkona vespero : "Bonan tagon! saluton ! Mi tre ĝojas revidi vin!" : bona etoso tiun-ĉi vendredon ĉe la kongresejo.

Sabaton, la 6an de aprilo je la 10a matene S-ro Texier malfermas la Nacian Kongreson, bonvenigas la ĉeestantojn kaj dum unu horo faras bilancon de la pasinta jaro.

Posttagmeze debato pri "Rilatoj inter la komunik-medioj kaj Esperanto" kun filmeto pri la funkciado kaj eldono de la gazeto "Le Courrier de l'Ouest".

Arta vespero konkludas la tagon kun Anĝevina folklora grupo kaj rakontoj kaj kantoj en Esperanto far J.P. Danvy, Ĵak Le Puil.

Dimanĉon okazas membrokunvenoj. La ĉefaj kaj diversaj punktoj rilatas al la movado : instrumentadoj,sidejo, libroservo,k.t.p. Vespere bankedo kunvenigas ĉiujn ĉe restoracio "La Boule d'Or" (La ora bulo).

Lundon, prelego de S-ro Stefan Mac Gill : "Novzelando kaj Japanio : 2 samtipaj sed ne similaj insuloj". Posttagmeze, duontaga ekskurso piede tra Angers (sub la suno),vizitado de la ĉefaj monumentoj,vidindaĵoj...

La lastan tagon, tuttaga ekskurso : kastelo de Plessis-Bourré kaj tagmanĝo ĉe "nia" kastelo Grésillon, la kultura "Domo" de la francaj esperantistoj.

S-ro Llech-Walter,unu el la fondintoj de la Esperanta domo kun S-ro Rousseau,S-ro Babin... gvidas por la nekonantoj la viziton tra la kastelo. Post tro mallonga restado la ekskursanoj foriras. Vizitado de la preĝejo de Cunault (Romanika preĝejo de la dek-dua jarcento),tipaj vilaĝoj laŭ la ĉefrivero Loire.Num Brissac,kastelo,preĝejo.Tie-ĉi

la ventmueliloj estas tre bone zorgataj. Kooperativo : vin-kulturo kaj -produktado, gustumado de blanka aŭ ruĝa vino,ĉiuj elektos... Halto ĉe la preĝejo de Pastro B.Gaudé.

Kun la komentoj de S-ino Cheverry je la 19a ni revenas en Angers.

Ĉiuj adiaŭas,ĝis Gérardmer (Vogezoj) dum Pentekosto,venontan jaron.

Unu el la Kongresanoj : C. Gérard el Perpignan

La 78a Nacia Kongreso okazos de la 16a ĝis la 21a de Majo 1986 en Gérardmer. Kongrestemo, kadre de la Internacia Jaro de la Paco de UNO: Esperanto, kiel helpilo por komuna paco.

Le congrès de l'UFE se prononce contre le racisme:

Les participants au Congrès annuel de l'Union française pour l'espéranto, qui s'est tenu à Angers du 6 au 8 avril 1985,

considérant l'importance des obstacles linguistiques à la communication, rappelant que la Déclaration Universelle des Droits de l'Homme à laquelle se réfèrent les statuts de leur association,condamne formellement toute discrimination concernant la race,la langue,le sexe et la religion.

soulignent que l'année 1985 a été proclamée Année Internationale de la Jeunesse, en conséquence, rappellent l'intérêt que présenterait l'utilisation, à côté des langues nationales et régionales, d'une langue internationale comme l'espéranto, déjà pratiquée dans plus d'une centaine de pays,

s'inquiètent de la montée actuelle du racisme, condamnent vigoureusement les attentats qui viennent de se produire dans notre pays, et souhaitent que, en particulier à l'occasion de l'Année Internationale de la Jeunesse, les organisations de jeunesse et les jeunes en général contribuent par leur action à l'élimination de toutes les discriminations, notamment celles précisées dans la Déclaration Universelle des Droits de l'Homme.

KARAVANO AL AŬGSBURGO (per trajno)

Vendredon 2-8-85:	Foriro Paris-Est	23.15	Alveno Aŭgsburg:	8.25
Sabaton 3-8-85:	" " "	7.52	" " "	16.21
Sabaton 10-8-85:	Foriro Aŭgsburg	13.55	Alveno Paris-Est	23.01
	aŭ " " "	20.46	" " "	6.44(dimanĉon)

Provizora prezo : 600 F, Anoncu vin rapide al Raymonde Pérault ĉe UFE.

Augsburg 3.-10.8.1985
2000 jara urbo



- 5 -
ESPERANTA FEDERACIO
"LANGUEDOC ROUSSILLON"
FEDERACIA KOMITATO

Fédération du Languedoc-Roussillon pour l'Espéranto

Président : Jean Hénin , Collège, 48500 La Canourgue

Secrétaire: Jean Amouroux , 1, Rue de Sorède -66000 Perpignan

Les représentants de la fédération du Languedoc-Roussillon pour l'espéranto, réunis en congrès à Nîmes, les 4 et 5 Mai 1985

- déplorent la réponse fournie par le Ministère de l'Education à la demande d'introduction de la langue internationale dans les écoles à titre d'option,
- contestent les arguments présentés pour ce refus :
 - a) la réciprocité évoquée n'est pas possible dans une Communauté élargie à 12 Etats, représentant 10 langues nationales différentes et 30 langues régionales ; le choix d'une langue-pont neutre est justement la solution que d'autres suivraient si la France donnait l'exemple (La Chine est le dernier en date des pays où l'espéranto est enseigné officiellement),
 - b) à la différence de toute langue nationale, qui ne permet l'accès qu'à une culture (à "une connaissance de civilisation"), la langue internationale donne accès à la culture mondiale et plus spécialement aux cultures minoritaires, tout en faisant connaître la culture française.
- émettent des réserves très vives sur les possibilités actuelles de communication pour les jeunes, citoyens du 21^e siècle où la technique réduira encore les distances, ainsi que sur le niveau de connaissance des autres civilisations atteint,
- soulignent qu'en plus de sa valeur reconnue d'outil de communication, accessible à tous, la langue internationale est une excellente propédeutique pour l'enseignement des autres langues et qu'un enseignement sérieux, même limité au départ à quelques dizaines d'écoles, donc n'entraînant que très peu d'investissements budgétaires, ne peut être laissé au bénévolat,
- rappellent enfin que, lors des deux précédentes législatures, une proposition de loi avait été déposée par le Parti Socialiste, signée par MM. Mitterrand, Savary, Chevènement et autres responsables des instances gouvernementales actuelles,
- demandent en conséquence qu'aboutisse le texte réglementaire projeté, dans le respect des signatures données.

Ce texte a été approuvé par les groupes de la fédération :

11: Carcassonne, Narbonne et Quillan.
30: Alès et Nîmes
34: Béziers, Lunel et Montpellier
48: La Canourgue et Mende
66: Perpignan.



EL LA GAZETARO :

Vi trovos ĉi-sube la raporton de "Midi Libre" pri nia federacia kunveno. Kvankam la raportistino ne estis favora al Esperanto, la rezulto estas kontentiga.

En la lasta numero ni menciis ("Letero el Nimo") la bezonon kompletigi la informojn, kiam temas pri lingvoj. Sufiĉas skribi al la ĵurnaloj, gazetoj, revuoj, kiuj kutime forgesas menciigi Esperanton. Dekstre vi trovos ekzemplon el "Dossier Familial", eldonita je 420 000 ekzempleroj de "Crédit Agricole". Ne forgesu sendi al SFS kopion de la aperintaj artikoloj!

LANGAGE

en

« Paroli Esperanto »...

Réunis ce week-end à Nîmes, les Espérantistes ont fait le point sur leur situation. Un souhait : que l'Espéranto figure un jour dans les programmes scolaires...

RANGERONS-NOUS bientôt dans nos placards « do you speak english », « aprechen sie Deutsch », et autres formules tout droit sorties de nos précis de conversation étrangère ? Nul ne saurait le dire avec certitude. Mais ce qui est sûr, c'est que le week-end dernier, au centre Pablo Neruda, ces formules n'étaient vraiment pas de mise, balayées par l'Espéranto dont les pratiquants de la région Languedoc-Roussillon tenaient leur congrès annuel.

Même les Chinois

Espéranto internationale créée en 1887 par Zamenhof, dit le petit Larousse illustré. Et d'ajouter qu'elle repose sur le maximum d'internationalité des racines et l'invariabilité des éléments lexicaux.

Aplanir les barrières de la langue, communiquer au-delà des différences, par dessus les continents et les races, n'avoir pour cela qu'une seule langue, comprise par tous, cela peut sembler utopique. Mais n'allez surtout pas le dire à ceux qui ont appris et pratiquent ce mode de communications, vous les vexeriez. Presque centenaire, l'Espéranto est parlé un peu partout dans le monde, où l'on recense entre un et cinq millions de pratiquants. Même les Chinois s'y mettent. On en dénombre déjà quelques cent cinquante mille, ce qui dénote un véritable engouement de la part de ce peuple pourtant très

réserve pour tout ce qui n'est pas chinois. Peut-être le fait que le Chinois et l'Espéranto se rapprochent du point de vue phonétique, n'est-il pas étranger au phénomène. Mais quand même, c'est significatif. Et sauf imprévu, Pékin accueillera en 1986, le prochain congrès international des espérantistes. C'est un signe qui ne trompe pas.

Dans certains grands pays ne disposant pas d'une langue unique, des associations ont choisi l'Espéranto pour communiquer. C'est le cas des spiritistes brésiliens.

Plus sérieux (ou considéré comme tel), l'adoption de cette langue par les scientifiques. Informaticiens, cybernéticiens n'hésitent pas à tenir congrès en Espéranto. Et certains d'entre eux n'acceptent pas de voir traduire leurs publications dans une autre langue que celle-là.

La France à la traîne

Dans l'hexagone, l'officialisation est moins poussée qu'à l'étranger. Et les espérantistes français le déplorent. « C'est surtout un manque de moyens », disent-ils. C'est vrai qu'avec une cotation de 25 frs par an, comme à Nîmes, il est difficile d'entreprendre de grandes œuvres. Mais cela n'empêche pas nos Espérantistes d'avoir la foi. Quatre universités françaises ont inscrit l'Espéranto au nombre de leurs unités de valeurs (U.V.) Ce sont

Aix-en-Provence, Nîmes, Clermont-Ferrand et Vincennes. Trois autres : Lille, Lyon et Paris V, le dispensent au titre de la formation continue. Une option comme une autre.

Verra-t-on un jour l'Espéranto figurer comme l'une des options de baccalauréat ? En attendant, un peu partout en France, on le pratique dans le cadre des activités extra-scolaires. Ainsi, à Nîmes, les élèves du lycée Faunhères ont deux cours de deux heures par semaine. « C'est facile », disent-ils. « Et la prof est sympa ». Et de renchérir, « il n'y a pas de déclinaisons ». Adieu accusatifs, datifs et génitifs, déclinaisons et verbes irréguliers...

Tintin et Astérix aussi

Sous la conduite de M. Jean Hénin, président fédéral pour le Languedoc-Roussillon, on a fait le point sur leurs actions. Samedi après-midi, après une communication de M. Morand, professeur à la faculté d'Aix-en-Provence, le programme comprenait un film sur la région, trois petites pièces de théâtre et la production des chorales Saint-Pierre et Concorde de Nîmes. Le tout en Espéranto, bien entendu.

A défaut de lire la prochaine thèse sur « les mousses et les lichens » dont la traduction est annoncée par les scientifiques pour 1986, sachez qu'Astérix et Obélix font partie des ouvrages traduits dans cette langue. A vos lexiques.

L'espéranto, une langue simple

"Dossier Familial" auquel je suis abonné et que j'apprécie à consacré dernièrement (n° 123) un article à l'apprentissage d'une langue étrangère. Vous avez soulevé des points importants comme : l'anglais, pour être utile, doit atteindre un degré élevé ou l'espagnol sera parlé par 500 millions de personnes en l'an 2000 etc. Il y aurait cependant beaucoup à dire sur la politique de diversification des langues que vous évoquez : une douzaine de langues sur 3000 existantes, dont plusieurs limitées à deux ou trois centaines d'élèves (notez que dans les collèges le choix se limite en général à deux langues et rarement trois comme il est affirmé) - sur l'importance qui leur est accordée (2 à 3 heures en lycée avec des classes de 35 élèves) - sur le seuil de communication atteint (1 500 heures minimum sont nécessaires pour parler vraiment une langue, le cursus scolaire en atteint la moitié). Sont aussi contestables des affirmations comme :

- "il n'y a pas de langues plus faciles et de langues plus difficiles" (avez-vous essayé le mandarin ?)

- "d'emblée le couple anglais-espagnol peut être considéré comme une option sûre" (à quoi bon l'article ? Un élève de Lyon n'aurait-il pas plutôt intérêt à étudier l'allemand et l'italien, langues de nos deux premiers partenaires commerciaux ?)

Babel pas mortel ! Permettez-moi d'ajouter qu'il existe aussi une langue internationale neutre et simple (150 heures d'études), enseignée dans quelques dizaines d'écoles et quelques universités mais malheureusement pas à un niveau officiel comme par exemple en Hongrie ou en Chine. Pour les adultes, il existe des cours dans la plupart des villes. Son nom : l'espéranto. Il existe des centaines d'occasions de pratiquer la langue internationale en France ou à l'étranger et ainsi connaître toutes les cultures et pas seulement la culture anglo-saxonne.

1987 étant le centenaire de la langue internationale, pourquoi "Dossier Familial" n'y consacrerait-il pas un article ?

* Renseignements auprès de l'Union Française pour l'Espéranto : 4 bis, rue de la Cerisaie - 75004 Paris. Tél. : 278.68.86.

M. Jean Hénin
48500 La Canourgue

TURISM-LIBRETO:

Skribas Claude Nourmont, 2 Om Kläppchen L 5682 Dalheim

"Estimataj Gesamideanoj,

Ciujare multaj eksterlandaj esperantistoj venas turismi en Francujo, kaj ankoraŭ pli multaj venos se post kelkaj jaroj okazos Universala Kongreso en Parizo. Ĝis nun ni ne povis disponigi al ili praktikan gvidlibron en Esperanto, kiu donus la necesajn turismajn sciindaĵojn.

Pro tio UFE planas eldoni facile manipuleblan kaj aktualigeblan gvidlibron, sub formo de sliparo. Sur ĉiu slipe estus priskribataj urbo, kaj ties ĉirkaŭaĵo, kaj la bazaj praktikaj informoj kiujn bezonas vojaĝanta esperantisto.

Por tiu-ĉi laboro via kunlaboro estas nepre necesa, ĉar evidente la plej fidindaj informoj venas de la surlokoj mem.

Ni ŝatus ricevi, sub formo de 1 ĝis 3 tajpitaj paĝoj, la jenajn informojn:

- nomo de la vilaĝo aŭ urbo, departemento, situo en la regiono aŭ kompare kun pli konataj lokoj;
- nombro de enloĝantoj ; alteco; atingebleco per diversaj vetur-rimedo; ĝemelaj urboj;
- historio de la loko ; ĉefaj eventoj sciendaj;
- vizitindaĵoj (kun precizigoj, kiel atingi ilin);
- elstaraj eventoj de la jaro (ekz. foiro, karnavalo, festivalo); gastronomiaĵoj.
- restadejoj (eble malmultekostaj hoteloj, sed specife tiuj eblecoj, kiuj ne aperas en tradiciaj gvidlibroj : junulardomoj, gruprestadejoj, naturamikaj domoj k.s.; tendumejoj..),
- adreso de la turismoficejo; ĉu ekzistas esperant-lingva informilo pri la loko?
- specifaj esperantistaj praktikaĵoj (UEA delegito, Pasporta Servo (jes aŭ ne), sidejo de la grupo, horaro de kunvenoj, aliaj faciligoj por esperantistoj ktp.).

Estus krome bonvenaj : indikoj pri la prononco de la nomoj; mapeto de la loko, eventuale de la ĉirkaŭaĵoj. Kaj kompreneble aliaj rimarkoj kaj ideoj viaj.

Tio, kio specife interesas nin, estas ĝuste tiuj informoj, kiujn lokulo scias, kaj kiun preterpasanto kutime bedaŭrinde pretervidas, havante nur la oficialajn informilojn.

Ni tre esperas, ke vi havos la eblecon helpi nin, kaj ni antaŭdankas vin multe pro via kunlaboro.

Plej korajn salutojn,
C. Nourmont "

====

Kelkvorte por la kunlaborantoj; kies slipeoj ankaŭ utilos por nia regiona libreto:

Estus bone uzi la samajn mallongigojn (vidu la prospekton pri Millau). Ne forgesu indiki sur la plano la parkejojn (por la aŭtistoj), la trajn- kaj aŭtobus-stacidomojn por la vojaĝantoj, la magazenojn (laŭ la difino :granda moderna vendejo) kaj la urbocentron. Plej praktike estus vin esprimi sur 2 aŭ 4 paĝoj (1,2folioj..) aŭ pli... Ne forgesu ilustrati la tekston per urb-blazono, poŝtmarko, plej konata loko (ilustraĵo)... Fine la tekstoj estu laŭ lingva vidpunkto korektaj. Kontroligi antaŭ tajpi, se necese. Laŭeble ni aperigos viajn kontribuojn en la venontaj SFS. Antaŭdankon!

J.H.

==

ALVOKOJ:

C. Nourmont (adreso ĉi-supre) ankaŭ listigas la librojn en iu ajn lingvo, kie Esperanto estas menciata eĉ malfavore.

Se hazarde vi trovas aludojn al E°, legante librojn, sendu prefere fotokopion de la teksto kun indiko de la aŭtoro, titolo, eldonisto, dato de eldono kaj numero de la paĝo.

==

Kelkaj esperantistoj klopodas, ke E° estu estonta komuna lingvo dum internaciaj vegetaraj kongresoj. Oni petas vin skribi en E° al la suba adreso, petante programon de la Eŭropa vegetarana kongreso, kiu okazos en Italio dum Aŭgusto 85 :

Associazione Vegeteriana Italiana
Viale Gran Sasso, 38
I.20131 Milano

==

VIVĜ de la GRUPOJ

Béziers: La grupo funkciigis 3 kursojn kaj starigis kontaktojn kun la esperantistoj de la ĝemela angla urbo kaj esperas viziton en la venonta printempo. La ĉefa celo en la lastaj monatoj estis la preparado de la staĝon les Sablières*. Gi bone sukcesis: 20 aliĝis, 19 ĉeestis**, el kiuj kelkaj novuloj, veraj komencantoj. La staĝoloko estis agrabla kaj ĉiuj ŝajnis kontentaj. Do, ni antaŭvidas novan staĝon en 86 de la 8a de Majo ("Ascension") ĝis la 11a kun plibonigoj. Rezervu tiujn datojn.

NDLR:* pro manko de spaco... kaj de raporto, ni ne povas detale priskribi la amikan etoson de tiu staĝo. Konvena estis la loko kaj oni serioze studis.

** ĉeestis ino de nedrelanda deveno kaj alia de germana deveno.

La Canourgue: La grupeto akceptis anglon (F. Buckley) en Marto kaj komence de Junio anglinon (B. Clarke), kiu ankaŭ vizitis la grupon de Béziers.

Carcassonne: Paĝa artikolo pri esperanto aperis en la bulteno de C.S.O (centro socia del' okcidento)



FRANK BUCKLEY

Federacio Gard: La jara kunveno okazis en Nimo, Centro Pablo Neruda, dimanĉon la 24an de Marto. R. Raynaud, prezidanto ekde la naskiĝo de la Federacio rezignis tiun funkcion. Paul Touron estis unuanime elektita kiel prezidanto, F-ino Coulomb estos vicprezidantino, S-ro Schlumpf sekretario kaj S-ro Dumas kasisto.

Montpellier

En Marto: diskutrondo, S-ro Diez gvidis ludojn, ĉeestis 4 novaj lernantoj.

En Aprilo: Y. Vierne raportis pri sia vojaĝo en Ĉinio. S-ino Boesiger, el la Scienca Fakultato montris diapozitivojn pri Ĉinio, kiun ŝi vizitis plurfoje. Ŝi venis dank'al S-ro Zhuo Zheng, studento en "polenologio" kaj amiko de Ges. Huberson, kiu parolis kun ni. (ĉeestis 26 personoj).

En Majo: S-ino Meynadier raportis pri sia ĉi-jara vojaĝo kun sia edzo al sia korespondantino en Nov-Zelando. La lumbildoj montris mirindajn pejzaĝojn. Gaja kunveno kun multaj partoprenantoj

Fine de Aprilo S-roj Capus k. Celiqva prezentis E*" al la membroj de la Rotary-klubo, kiuj interesiĝis.

La grupo petis de la turisma estraro (en Montpellier) eldonon de prospekto en E*.

La finjara renkontiĝo okazos la 22an de Junio ĉe Ges. Diez ekde la 5a vespere.

La semajno de Sète prepariĝas, anoncis sin pluraj eksterlandanoj inter kiuj Japano.

Perpignan: La 21an de Aprilo la grupo renkontis la ĝemelan grupon de Girona en Collioure. Partoprenis trideko da personoj. Post vizito al la tombo de la hispana poete Antonio Machado, ni piknikis kaj poste aŭdiĝis kantoj kaj muzikis la "Gajaj Trobadoroj".

La 18an de Aŭgusto okazos la kutima somera renkontiĝo en la vilao de R. Llech-Walter, "Sunradio" 38, Boulevard de la Mer 66700 Argelès.

Je la 11a matene: komuna banado Je la 13a: pikniko Je la 15a h.: Marguerite Gouges, el Banyuls dels Aspres, kantos en E*. Ĉeestos Nederlandanoj, Belgoj, Poloj, Rumanoj, Kataĉiuj esperantistoj feriontoj en la regiono estos bonvenaj.

(lunoj....)

J. Amoureux, okaze de siaj regulaj rubrikoj en "la philatélie française" informas pri la movadaj aranĝoj.

Imitinda ekzemplo: Ankaŭ je la iniciato de J.A. Saleilles atribuis la nomon "Doktoro L.L. Zamenhof" al unu el la planataj vojoj de la komunumo. Najbaros la vojoj "Gustave Eiffel" kaj "Marcelin Berthelot", du famkonatuloj, kiuj favoris E*.

SENDU VIAJN RAPORTOJN/ANONCOJN ANTAŬ LA FINO DE SEPTEMBRO. Por la legebleco de la tekstoj, sendu bonajn fotokopiojn aŭ la originalon. Kelkajn tekstojn ni devis rifuzi ĉar fotokopio de malbona fotokopio ne povas rezultigi legeblan tekston! Dankon!

P.S. Ankaŭ la grupo de Nîmes aktivis por la federacia kongreso. Gratulojn pro la bona disvolviĝo (la paĝo la estas fotokopio de la prospekto eldonita je tiu okazo).

AFISOJ por reklami kursojn, prelegojn, ktp, estas disponeblaj: Tri koloraj, en la formato 18x28,5cm kun blanka spaco por aldoni informon. Ĉiu afiŝo = 1F. Afrankite: 10 ekzempleroj = 15F, 15 ekz. = 21F, ktp. (Fed. du L-R. CCP 956-28P Montpellier) sin turni al la kasistino: S-ino Négron, 40 Chemin des Amandiers. 34400 Lunel.

MOVADO.MOVADO.MOVADO.MOVADO.MOVADO.MOVADO.MOVADO.MOVADO.MOVADO.MOVADO.MOVADO.MOVADO.MOVADO.MOVADO.

V I D P U N K T O : K I O M E S T A S L A E S P E R A N T I S T O J ?

Generale oni respondas nek precize nek rekte al tiu demando; oni parolas pri delegito-servo, kongresoj, fakaj asocioj, gazetaro kaj aliaj montraĵoj por uzo de esperanto.

Iuj tamen provas respondi cifere. Jam de jaroj oni diras: "unu miliono". Nun verŝajne estas pli.

Sed eĉ se oni povus anonci nombrojn pli grandan ol tiu de multaj popoloj (ekz. Islandanoj, Danoj, Bulgaroj), tiu nombro estas nesufiĉa ĉar temas pri homoj, kiujn oni ne povas kontakti pro la diseco (aŭ nur eta parto en difinitaj okazoj, ekz. Universalaj Kongresoj).

Pro tio mi proponas, ke oni enlistigu laŭeble ĉiujn, kiuj scipovas la esperantan lingvon.

Estas membroj de SAT, de UEA kaj ankaŭ membroj de fakaj asocioj (aŭ frakcioj), kiuj aliĝis kiel individuaj membroj nek al SAT nek al UEA, do eĉ se ĉiu asocio publikigus liston de siaj membroj, estus malfacile kontakti iun ajn el tiuj esperantistoj.

Oni faru do jarlibron, pli bone adresaron, kiu estu periode reeldonita sed ne necese ĉiun jaron (por komenci). Oni faru tion por departemento (franca regiono), ĉar estos facile fari ĝin.

La departementaj grupoj unuiĝintaj aŭ dep. federacioj facile enlistigos ĉiujn konatajn Esperantistojn.

La kostoj de tiu adresaro estos nur eta parto de propaganda buĝeto; ĝi estos disdonata en trafikaj lokoj kiel propaganda materialo kaj individuaj homoj pagos ĝin je ĝia kosto por havi ĝin.

Mi daŭrigos laŭeble, prefere se tiu projekto interesas.

Lucien ANGEVIN, rue Bernard Lazare
30740 Le Cailar.

Noto de la redakcio: Antaŭ kelkaj jaroj aperis la unua eldono de "Tutmonda Esperantista Adresaro" kun pluraj miloj da adresoj. La Brita E*-asocio publikigas adresaron de siaj membroj; ĝi estas malmultekosta kaj aĉetebla de ĉiuj. Do, kion vi opinias pri la sugesto de L. Angevin?

A R G U M E N T A D O : Anstataŭ la kutima "Letero el Nimo" vi trovos en tiu-ĉi n° franclingvan paĝon pri E* kaj kulturo (p.7), ankaŭ verkitan de Valcoq. Aliajn ekzemplerojn de tiu paĝo ni povas liveri al vi senpage (nur sendkostoj). En la venontaj numeroj aperos aliaj paĝoj pri "E* kaj turismo", "E* kaj la angla lingvo", "Artefarita lingvo?"... Kontribuu al ĉi tiu realigado de tiuj paĝoj, sendante argumentojn al J. Hénin 48500 La Canourgue. Antaŭdankon!

P I E D M I G R A D O : Interesa aranĝo por piedmigrantoj estas anoncata en Lozère (la informo alvenis iom tro malfrue por la antaŭa numero), de la 1a ĝis la 6a de Julio en la Eŭropa vilaĝo Le Pouget, je 2 km de Villefort, fervoja linio Paris-Nîmes (je 100 km de Nîmes). La celo de la Eŭropa vilaĝo estas organizi internaciajn renkontiĝojn okaze de propravolaj "laborejoj", speciale por gejunuloj, en vilaĝeto el granito kun platŝtonaj tegmentoj, meze de la nacia parko de Cevenoj...



Krom la "laborejoj" okazas aliaj aktivajtoj: restadoj kun temoj, seminarioj, lernejoj, vojaĝoj, klasoj pri naturstudado, metiistaj staĝoj, ktp.

Pri la planita piedmigrado por esperantistoj kaj ne-esperantistoj respondecas la asocio "Chemins" B.P.36 48400 Florac (tel 66-45 02 03). Oni tranoktos en etap-kuŝejo (20/25F ĉiunokte) kaj dividos la kostojn por manĝi. La aliĝilo kostas 200F. La etapoj tra Lozer-montaro estos 15-20 km-n longaj.


Por detaloj kontaktu Ginette Gabillon, 32, Rue Renault-33200 Bordeaux Caudéran.

E S P E R A N T O - D O M O J : E* domoj malfermiĝas ĉie... Grésillon, La Chaux de Fonds, Pisanica (BG) estas bone konataj. La bulgaraj esperantistoj preparas trian domon, la Poloj renovigas barokstilan kastelon en Grodziec (Malsupra Silezio), la Angloj adaptas renkontejon apud Derby. Iom post iom Esperantujo konstruiĝas! Al ĉiuj BONAĴN FERIOJN EN ESPERANTUJO (ne forgesu sendi raportojn!!)



Distra Paĝo.

Krucvortoj de R. Raynaud: (R= Radiko)



Horizontale: I: Kunaŭtoro en komuna verko
 II: Futbalisto- Unuo de elektra povo (R). III: Rongŭlo. Restaĵo el la korpo de iu sankta persono
 IV: sufikso - La II ludas per ĝi (R). Helena sofisto (R)
 V: Parto de armeo - VI: Ne organizita grupo (R)
 Akre ironia rimarko (R) VII: Turni teksaĵon per ĝiaj ekstremoĵoj en reciprokaj kontraŭaj direktoj (R).
 Eligi akran bruon de skrapado. VIII: specio de gado.
 La plej granda specio estas olivarbo: IX: Maceru tekseblan planton. Prepozicio. Inverse: desegno aŭ projekto. X: Nomo de virino. Vermo ne havas (R).
 XI: Enspiri (tabakon) en la nazon. Skriba duel-invito (R)
 XII: Paroladeto dum festeno, kun propono trinki je ies sano. Speco de vitro (R)

Vertikale: 1: Desegnisto (R). 2. Fortega vento. Argila aŭ metala vazo ĉe la antikvuloj. Kunfiksas du platojn (R). Eksentus doloran iritan sensaĵon kiel per frotado de la vesto sur la haŭto.
 4: Rabobesto. Sendanĝera ulcereto de la buŝa mukozo (R).
 5: Sufikso. Sufikso. Inversita sufikso. Nedefinita pronomo. 6: Bufono 7: ĝi formas la kubuton. Rapide, abrupte kaj ripete movi ion tien kaj reen (R) 8: Karaktero atribuita al aktoro en teatraĵo (R). En Irano aŭ Irako. En Kanado. 9: Okazanta en temp-intervaloj egalaj (R) Rifuĝi sen fuĝi. 10: La malantaŭa parto de la kolo. Arbo kun longaj pintaj folioj kulturata por bredado de iu speco de silkraŭpo. 11: Inverse: Tia kargo de ŝipo ne moviĝas sub la ago de la tangado aŭ de la ruliĝado (R). Speco de angla biero (R). Prepozicio. 12: Inverse: fino de baloto. Li ne vidas pli longe ol la pinto de sia nazo.

Solvo de la numero 92: Horizontale: Meleagreno/Elokventaj/Liki/Nis/Akompani/NS/ol/Kr Ki/Zefiro/Orgojl'/Ema/ Lol'/Orpel/Uzuristo/Onikso/Caz'.
 Vertikale: Melankolio/Eliksiro/Loko/Glui/Ekimozo/Zk/Av/Plej/Us/Geta/Floro/Rn/Nei/Ri Etni'/Repos/Nai/Kometa/Ojstr'/Aloz'

La kaŝita proverbo estis: Urson al mielo oni ne tiras per oreloj.

ENIGMO

Trovu vortojn kun la sube indikitaj signifoj. La unuaj silaboj kunigitaj laŭ la sama ordo donos al vi proverbon

Mediterranea insulo: Malto Diablo aŭ...anĝelo: 24 horoj : tago.....

Parto de nutrokanalo: intesto ĝis tagmeze: petalaro:

Mediterranea frukto : olivo..... regnestro : regno..... Angla havenurbo: Liverpool.....

Tre bezonata : neesa..... posedi : havi..... Kovranta grandan spacon: vastio.....

Proverbo:



 * Dans le cadre du centenaire de l'espéranto
 * (1887-1987), la revue bimestrielle "CONFLUENT"
 * ("Les Castors", 3, rue des Mimosas, 66500 PRADES)
 * va consacrer un numéro spécial à l'
 * "HISTOIRE DU MOUVEMENT ESPERANTISTE EN ROUSSILLON"
 * rédigé en français par Jean Amouroux,
 * Marie-Thérèse et Robert Lloancy.
 * Cette édition de présentation très soignée est
 * prévue courant Septembre 1985 et comportera plus
 * de 100 pages de texte et de très nombreuses
 * illustrations.
 * Son prix est de 45,00 F franco, l'exemplaire.
 * Remise à partir de 10 exemplaires.
 * Joindre le règlement à la commande.
 * *****